

# ESPERO KATOLIKĀ

REVUO MONATA

## FRANÇOIS COPPÉE

SKIZO. — EKSTRAKTOJ. (Sekvo)<sup>1</sup>

« Dum semajnoj, monatoj pasitaj en lito kaj interne de ĉambro, mi do vivadis kun l'Evangelio ; kaj iom post iom ĉia linio de l'Sankta Libro iĝis vivanta kaj igis min certa, ke ĝi diris la veron. Jes, en ĉiuj vortoj de l'Evangelio mi vidis la veron briligi kiel stelo, mi sentis ĝin batadi kiel koro. Kial mi ne kredus la miraklojn kaj la misterojn, nun kiam plenumiĝis en mi tiel profunda kaj mistera aliformiĝo? Animo mia estis blinda pri la lumo de l'kredo kaj nun vidas ĝin en plena ĝia beleco ; ĝi estis surda je la Vorto de Dio, kaj aŭdas ĝin hodiaŭ en ĝia konvinka dolĉeco ; ĝi estis paralizata de indiferenteco, kaj nun altiĝas al la ĉielo per sia tuta flugemo ; kaj la malpuraj demonoj kiuj ĝin maltrankviligis kaj posedis estas por ĉiam el ĝi forpeltaj ! »<sup>2</sup>

Post multe da preĝado, post longaj studoj kaj meditoj pri l'Evangelio, F. Coppée decidis, fine de oktobro, ricevi la sanktan Eŭkaristion. Li tiam ĝuis « tiun pacon animan, kiun oni ricevas nur de la mirinda disciplino religia ». Li tiele finas l'Antaŭparolon de *La Bona Suferado* : « La disaj folietoj, kiujn mi hodiaŭ kunigas kaj kiuj, mi tion rediras, ne meritas la nomon libro, estis skribitaj de mi dum l'anima krizo, kiun mi resume rakontis. Dum la publikigado de ili en ĵurnalo, ilia sincereco, mi tion scias, jam tuŝis pli ol unu koro kaj rekondukis al la Kruco kelkajn animojn, kiuj de longa tempo foriris de ĝi. Mi tre dolĉe fieriĝis pri tio, sed ne surpriziĝis ; ĉar multaj spiritoj, — treege tenitaj de l'triumfanta materialismo kaj detrompitaj pri tiom da aliaj dogmaroj filozofiaj, kiuj eble enhavas parton da saĝo kaj vero sed kies la plej bona taŭgas nur por tre malmultaj eminentuloj, — estas nun altiritaj al la malfermitaj brakoj de l'Krucumito. La plimulto tamen tenitaj de resto da malbona malhumileco, ankoraŭ haltas sur la sojlo, de l'Evangelio. Ili vidu, en tiuj paĝoj, kiel feliĉa mi estas ĉar mi ĝin transiris, kaj fariĝu ke kelkaj el tiuj ŝanceliĝantoj estu konvinkitaj de mia ekzemplo kaj de mia esprimado de kredo ». <sup>3</sup>

Jen traduko de ĉapitro eltirita de *La Bona Suferado*. <sup>4</sup>

## SUPER LA NUBO

Antaŭ ian nombron da jaroj, dum ia januara monato pli-ol-kutime nebulega, mi devis pasi semajnon en Genevo.

1. Vidu E K. n-o 15.

2. Antaŭparolo, p. 13.

3. P. 18-19.

4. Eldona kun afabla permeso de F. Coppée kaj de la firmo eldonista A. Lemerre el Parizo.

En vintro kiam la ĉielo estas malgaja kaj malhela, tiam la kalvinista Romo havas sian veran fizionomion, kaj oni ĝin ne konasse oni vizitas ĝin dum la bela sezono, kiel faras la turistoj. Kiajn memoraĵojn pri ĝi ja ili gardas? La sensimilan pejzaĝon de la lago kaj montaro, la luksajn hotelojn subordajn, la elegantajn magazenojn de la Coratterie (Koratri') la kosmopolitan pepadon de la trairantuloj sur la ferdeko de l'ŝipo de Lausanne (Lozan') : tio estas preskaŭ ĉio. La memoro de Kalvin'o estas neniel alloganta. Malmultaj estas la vojaĝantoj kiuj deziras serĉadi la postsignojn de l' terura sektano en la krutaj stratetoj de l' antikva urbo aŭ sub l' arkaĵoj de Sankta Petro; kaj la turisto gardas pri Genevo nur supraĵan impreson kiel pri riĉa kaj bela urbo, en grandioza kaj ĉarma pejzaĝo.

Por senti la poezion malvarman, sed fortan, de l' antikva citadelo de la Reformo, oni devas ĝin viziti, kontraŭe, en plena vintro, kiam la severegeco de l' vetero estas laŭa kun tiu de la lokaj moroj kaj kiam blovas vento tiel akra, kiel teologia disputado...

La Lemano' kaŝas sin en la nebulo, kiel se ĝia voluptiga lazuro timis ofendi la hugnotan hontemon, kaj la skeletoj de l' arboj estas sekaj kiel reforma predikado. Tial estas tempo por grimpi en la nigrajn kaj malsekajn stratojn de l' alta urbo. Jen estas iaj dezertaj placoj, kie senfolia ulmo elstaras supre de malnova ŝtuparo ŝtona; kaj, sen multa peno, oni imagas, ke Kalvin'o mem aperos, kun vesto kaj ĉapo nigraj, tenanta dikan Biblion fermilhavan sub sia brako malgrasega, kaj murmuretanta, en sia pinta barbo, ian malbenon kontraŭ la malĉastuloj kaj herezuloj. En tiu malhela kvartalo troviĝas ankaŭ la strato « Granges ». la Geneva « Saint-Germain » posturbo, kie, en malnovaj hoteloj, loĝadas riĉuloj kaj piuloj, kiuj, la tutan jaron, faras preĝojn kaj ŝparojn.

Se poste oni malsupreniras en la modernan parton de l' urbo kaj enmiksiĝas en l' ageman popolamason de la komercaj stratoj, oni retrovas sur multaj vizaĝoj la saman karakteron de severeco malafabla. La hominoj, envolvitaj per feloj kaj vualetoj, ŝajnas kaŝetisian belecon kiel objekto skandala, kaj, sur la sĵlo de la Borso, oni rimarkas sinjorojn kun grava kaj meditema mieno; ili estas bankieroj kaj interparolas pri la kurso de valoroj; sed ili pliŝajnas kleraj doktoroj laŭ ekzegezo, disputantaj pri la signifo ne ia sankta teksto.

Pardonu al mi la bonaj Genevanoj la ŝercan maliceton de tiu skizo. Mi ne forgesas ilian koregan akcepton, nek la ŝatindan simpation, kiun mi recevis de ili, kiam mi iris Genevon por deklami miajn versaĵojn. Kiu ne estimus kaj ne admirus, cetere, la urbon gasteman kaj studeman, la urbon de inteligenteco kaj libereco, naturan rifuĝejon de tiom da ekziluloj!

Sed la Genevanoj konsentos, ke la vintro estas terurega ĉe la bordo de l' Lemano'. Mia tremeto kaj korpa ĝenado estis do pardoneblaj ĉi tiun matenon de januaro, kiam mi konstatis, tuj post mia vekigo,

tra la vitraĵoj de mia fenestro, atmosferon malesperigan kaj memmor tigemana, abomenan nebulegon, kiu malbonodoris fulgon kaj penetris eĉ interne de la loĝejoj.

Subite, l'amiko, kies gasto mi estis, eniris mian ĉambron kaj gaje diris al mi

« Ĉu vi volas vidi la sunon? »

(*Sekvo venos*).

(*Reeldono malpermesata*).

Em. PELTIER.

## STENOGRAFIO POR ESPERANTO

Estimata Sinjoro.

« Mi legis en E. K. vian alvokon pri speciala stenografio por Esperanto, Tiomin pleje interesas. Amadante varmege stenografiarton, mi studis diversajn sistemojn ankaŭ eksterlandajn kun ĝiaj alfaroj por fremdaj lingvoj. Post severega pruvo mi devas sincere konfesi, ke la alfaro de P-o Schneeberger estas la plej taŭga.

« ... Vieble estas Duploye'ano; sed vi pardonos al mi, ke mi ne povas laŭdi la Duploye'an metodon, .. Se vi ne akceptus la ĉi-apudan rapidskribon (laŭ P-o Schneeberger, kies specimenon donas la letero), mi rekomendas la alfaron de Holando Bulthuis, kiu elverkis la Scheitaŭer'an sistemon Esperanten, iomete ŝanĝinte ĝin. La dirita metodo plaĉas al mi pro ĝia logikeco kaj simpleco. Se eĉ tiu sistemo ne estas juĝata akceptinda, mi proponas prijuĝi holandan originalan sistemon de Groote. S-o Advokato Cogen, Gentano, skribis al mi, ke tiu sistemo estas vere tutlitera. Mi studis ĝin dum mia vojaĝo tra Holando. Se oni skribas Esperantan tekston, oni ne bezonas, — laŭ opinio de S-o Cogen, — ŝanĝi literojn de l'Groote'a sistemo. Li nur aldonas signojn por kelkaj Esperantaj sonoj, ekz. por ĝ, ĵ. kaj aliaj.

A FROHNS, (el Lindaŭ, Harz, Germanlando).

Estimata Sinjor'Direktoro.

« Oni jam proponis diversajn sistemojn de stenografio por Esperanto, sed preskaŭ ĉiuj estas nur *alfaroj*... Ŝajnas al mi, ke alfaroj povas doni nur difektan sistemon. Ĉia lingvo, ja, havas propran strukturon Esperanto kiel ceteraj. Sekve, literoj oftaj en aliaj lingvoj estas maloftaj en Esperanto, kaj reciproke. Iaj grupoj da du, tri konsonantoj estas tre komunaj en nia lingvo, kaj eble eĉ ne troviĝas, aŭ malofte troviĝas en ceteraj. Antaŭ ĉio oni devas do studadi la strukturon de Esperanto, kaj determini la *oftecon* de la diversaj literoj kaj grupoj de literoj. Nur post tio, oni povos elekti taŭgajn signojn, kaj oni komprenos ke ne estas eble alfari *praktike kaj efike* sistemon ian al la lingvo Esperanto.

Vi kontraŭdiros, ke tiaj alfaroj jam ekzistas kaj taŭgas. Mi konsentas ke illi povas iel utili; sed laŭ mia opinio tre preciza, sistemo verkita originale por Esperanto devas superi ĉiuspecan alfaron.

Nenio pli facila ol *teorie* imagi aron da signoj reprezentantaj ĉiujn la literojn de l'alfabeto Esperanta : tio estas amuzajo facila. Sed kiam iu volas *sekvi la parolon* per tia sistemo; li rapide elreviĝas...

Ĉar oni ne devas forgesi, ke la *unua* celo de stenografio estas skribi sufiĉe rapide por sekvi parolanton. Uzi stenografion por korespondado, por persona laboro, tio ŝparas multe da lempo, kaj alfaro ia povas sufiĉi por tio. Sed ĝi estas nur flanko celo de stenografio. Rapidskrikado devas igi kapabla sekvi parolanton kaj skribi ĉirkaŭ 80 vortojn ĉiujn minute. Sistemo, kiu povas tion efektivi, taŭgas egale por ceteraj uzoj. Ni do deziregas kreadon de stenografio tute speciala por Esperanto<sup>1</sup>.

Prof. E. LIME.

## EN MANĈURIO

Oni legas en *Revue de la Paix* (Revuo de la Paco), nov.-dec. 1904 :

« Rusa soldato, vundita en la dekstra brako, apud Liao-Yang falis svenante: rekonsciiĝinte, li vidis sin sola. Malfacile li leviĝis, kaj estis tuj provonta reiri al siaj kamaradoj, kiam, el gaoliana arbetaĵaro eliris kapo de japano, kiu rampante direktiĝis al li. La soldato prenis rapide sian pafilon per la maldekstra mano, preta por defendi kuraĝe sian vivon.

— Ne mortigu min, diris la japano en korekta rusa lingvo. Mi estas vundita kiel vi!.....

La ruso, ellasante sian armilon, alproksimiĝis al la malamiko, kaj volis rigardi lian vundon; la japano estis vundita en la maldekstraj brako kaj kruro. Tiam, la ruso, per sia maldekstra mano, bandaĝis la japanon tiel bone kiel li povis; kaj la japano, per sia dekstra mano, faris al li similan servon. Poste, ili sidiĝis unu apud l'alian; la japano havis provizon da rizbrando, la ruso kelkajn biskvitojn; ili dividis frate inter si. Post kiam ili estis refortiĝintaj, la ruso serĉis bastonon por la japano; fine, ili manprenis, kaj disiĝis por reveni en siajn proprajn tendarojn. »

Por kion fari? Por sin prepari por mortigi unu la alian, post kiam unu provis savi el la morto la alian. Ho! homa absurdeco!

Esperantigita de Paul TENNESON.

## KOKINO (Sekvo).

La morgaŭan tagon, Jean-Claude loĝiĝis, kun sia familio, en ĉambreto sur l'aleo de Saint-Ouen; li aĉetis dorsokorbon, hokon por kolekti ĉifonojn.

Komence, en ĉiu tago li gajnis tri frankojn; kaj fariĝinte pli sperta li pliigis sian salajron kaj gajnis ĉiutage kvin frankoj. Li aĉetis mal-

1. Ni scias, ke sistemo laŭ tiuj principoj estas nun preskaŭ preta. Sed la aŭtoro ne volas ion publikigi pri ĝi antaŭ ol ĝi estu plenefinita.

grandan puŝveturilon, kaj per helpo de la plej maljuna el siaj infanoj li aĉetis ĉifonojn dome.

Tio sukcesis; lia edzino dispecigis ĉifonojn kiujn li revendis multe profitanta.

Li sukcese komercis; luis teretaĝon kaj halon, vastigis sian negocon, dungis laboristinojn por dispecigi la ĉifonojn kaj baldaŭ kolektis multe da mono.

Tial li fariĝis pogranda komercegisto, havis oficistojn, veturilojn, lia firmo estis unu el la plej gravaj en Parizo; liaj infanoj donis al li sian grandan kunhelpon.

Li utile procentedonis, fine prosperis al li fariĝi riĉa; la du mil frankoj de la bankiero multiĝis.

Li nur deziris trovi sian senvolan bonfaranton por redoni al li lian monon. Tia penso lin maltrankviligis, sed nesciiginte pri la bankiero li malesperis.

\* \* \*

Atakite Van Gorde unue intencis porti la aferon antaŭ juĝistaro, sed pripensante, li diris al si ke l'atakanto estis mizerulo kiun incitis la malsato. La bankiero neniam pri tiu-ĉi aventuro parolis kaj baldaŭ ne rememorigis plu.

Dek kvin jaroj pasis kaj la bankiero malprosperis; pro bedaŭrindaj spekulacioj lia situacio fariĝis malfacila. Ian postagmezon, Jean-Claude venis ĉe la bankieron enspezi por ĉeko.

Van Gorde estis en sia oficejo.

— Estas strange, diris li al si, mi jam vidis tiun-ĉi individon.

Li penis rememorigi.

— Estas eble mia atakanto! ekkriis li.

Li informiĝis pri la posedanto de la ĉeko, sed pro la situacio de sinjoro Dureau, Van Gorde pensis ke li trompiĝas.

Poste iu oficisto donis sciigojn pri la malgravaj komencoj de l'komercisto kaj Van Gorde mem, sciiginte, plene konvinkis sin pri la vereco de siaj konjektoj; — sinjoro Dureau naskiĝis en Fontainebleau.

Jean-Claude revenis. La bankiero nepre rekonis lin sed silentis ĉar li havas ideon.

Pretekstante gravan komunikon li venis ĉe la komerciston kiu ricevis lin en sia oficejo.

— Sinjoro, diris la bankiero rigardanta rekte al la komercisto, mi tuj proponas ke vi aĉetu de mi kokinon.

Jean-Claude pensis ke la vizitanto frenezigiĝas.

— Tia aĉeto ne okupas min, respondis li, turnu vin al la kuiristino.

Van Gorde ĵus eligis el vaflumita paperujo ponardon kaj kokinon.

— Ĝin al vi mi deziras vendi, aldonis li: dek kvin jarojn antaŭajn mi aĉetis de vi kokinon po du mil frankoj; mi rekonas vin.

— Ĉu estas vi, ekkriis Jean-Claude, mia bonfaranto! Kiel feliĉa mi

estas vin retrovi! ne po du mil frankoj sed po dudek mil frankoj mi vian kokinon aĉetas.

Li rakontis sian vivadon, priskribis sian mizeron, sian malesperon kaj petis ke la bankiero pardonu.

Kortuŝata Van Gorde premis lian manon.

— Jam de longe mi ĉion estis forgesinta kiam mi vin rekonis. Se mia situacio ne estus malfacila, mi ne vin vizitus.

Pri dirita situacio informiĝis Jean-Claude kiu donis al la bankiero helpan monoferon.

Jean-Claude kaj Van Gorde estas nun la plej bonaj amikoj kaj la proksiman monaton la plej maljuna filo de l'Ĉifonisto edziĝas je la filino de l'bankiero.

(France verkita de EUGÈNE FOURRIER, el la Societo de Literaturistoj; esperantigita de A. DENONCIN kun permeso de l'aŭtoro).

## KION VI PENSAS

1° Pri la kreo, organizado okupado, de Centra Komitato, aŭ Akademio Esperantista?

2° Pri la verkado de « *Universala Vortaro de nomoj propraj* », a) personaj (baptomoj), b) geografiaj?

Ni plezure enpresos la leterojn, kiuj interese respondos tiujn du demandojn. Ni esperas, ke *pluvego* da leteroj alvenos sur la skribotablon de nia Direktoro!

## NOTETOJ

**Tagkalendaro Esperantista.** — S-o J van Enxhut, Westerstr. 7 bis, Utrecht (Holando) intencas eldoni « *Ŝirkalendaron Esperantistan* » por 906, kies kosto estos 1 fr. 10. Oni povas de nun adresi la mendojn al l'eldonisto, tial ke li volas presigi la kalendaron komence de julio proksima. Ni varme rekomendas al niaj legantoj, ke ili subskribu almenaŭ unu kalendaron. Oni estas petata senti poŝtmarkojn nur se ne estas eble pagi per interancian mandaton.

**La Verdad.** — (Marto 2-a) enhavas longan artikolon pri Esperanto, en kiu oni afable parolas pri *Espero Katolika*.

**Bulletin de l'Union Catholique du personnel des Chemins de fer (Marto).** — Raportas, per la plumo de sia Sekretario, pri la dialoga parolado de S-oj Devoucoux kaj Rigoir, kiun ni notis en nia lasta n-o. Dankon al la Sekretario de l'Bolteno pro liaj afablaj paroloj pri E. K.

**La Alĝera stelo.** — Nova revueto aperis, por la propagando de Esperanto en Alĝerujo. Ni sendas fratan kaj simpatian saluton al nia nova kunfrato, kaj ni deziras al ĝi longan kaj fruktodonan vivadon.

**Nova itala gazeto** Esperanta baldaŭ aperos, sub la direkcio de S-oj D-ro Giovanni Cacciapuoti, kuracisto, kaj D-ro Rafaele Bagnulo, advokato. La kosto de l'jara abono estos du frankojn en Itallando,

kaj kvar fr. ekster Itallando. Oni sendu ĉion, kio rilatas al la ĵurnalo al S-ro Bagnulo, Largo Gesu e Maria, 4, Napolo,

**Womanhood** (Marto) — Kion faras la virinoj en norda Angllando, en Skotlando, Irlando, Franclando, Aŭstrio, Ameriko, Aŭstralio, Sud-Afriko, Indujo. — Ŝakludaj novaĵoj kaj problemoj. — Leciono 4-a pri Esperanto, de S-oj Martyn Westcott kaj P. D. Hugon. Konkurso pri Esp. kun premioj (Angle redaktata revuo).

**Revuo de Franca Pastraro.** — (France) en ĝia Marta 15-a n-o enhavas artikolon de la Direktoro de E. K. pri « Lingvo internacia Esperanto » La simpatia Direktoro de la Franca revuo afable akceptis tiun artikolon, kaj volonte enpresos la respondojn kaj diskutadojn pri Esperanto, Espereble, tiu iniciativo estos fruktodona.

**Ekspozicio en Alĝero.** — La Nordafrika grupo organizas en Alĝero gravan ekspozicion, kiu, intence, okazos santempe kun du kongresoj, inter kiuj unu estas internacia: tiu de la orientajistoj. Estas devo por ĉiuj societoj, grupoj, gazetoj kaj izolataj geesperantistoj sendi al la grupo Alĝera kiel eble plej multajn sciigojn. Oni petu specialajn klarigajn presaĵojn de S-o Kapitano Capé, 17, B-d Gambetta, Alĝero. La ekspozicio okazos de la 15-a ĝis la 26-a de aprilo.

## ŜAKLUDADO INTER ESPERANTISTOJ

ŜAK-REDAKTORO — « J. L. S., » ĉe La Direktoro de E. K.

Karaj legantoj! Laŭ la peto de via Direktoro, mi volonte konsentas redakti tiun-ĉi paĝon. Mine estas speciale kapabla por tia celo, kaj por ke mia laboro prosperu, mi bezonas vian helpon kaj konsilon.

Komence, mi ne konas la gradon de via lerteco. Skribu al mi, mi sincere petas, dirante ĉu vi estas lernanto, mezelerta, aŭ ŝakmajstro. Se vi estas tiu lasta, mi transdonos mian oficon kune kun ĝia salajro. Skribu ĉu vi amas problemojn malfacilajn aŭ facilajn; ĉu vi pliŝatas ludfinojn; ĉu vi preferas ludojn de majstroj aŭ de ŝakamantoj. Skribu ion, kio, laŭ via opinio, povos helpi kaj gvidi min. Inter multego da konsilantoj, jen la saĝeco! Mi kore invitas ian problemverkanton, permesi al mi montri specimenojn de lia lerteco. Efektive, ia helpo ajn estos akceptata kun ĝoja bonveno kaj sincera danko. Adresu ĉiujn leterojn al « J. L. S., » ĉe La Direktoro, de E. K.

Kiam mi ricevos viajn multajn repondojn, mi penos vin kontentigi. (Sed memoru bone, ke ne estas eble kontentigi ĉiujn samtempe.) Ĝis tiam, mi proponas la sekvan programon

Mi supozos ke vi scias la ŝakregularon, la Esperantigitajn teknikajn ŝakvortojn, kaj la metodon por noti la irojn. Se ne, sendube ŝakluda amiko instruos vin pri la regularo, kaj koncerne la cetero, bonvolu legi du artikolojn pri ŝakoj, kiuj aperis en « Lingvo Internacia » Sept. kaj Okt. 1903.

Mi respondos je ĉiuj demandoj, sed nur per tiu-ĉi paĝo.

Krom tio, le ŝakpaĝo enhavos unu aŭ du mallongajn, brilajn ludojn,

ludojn luditajn koresponde inter Esperantistoj, ludojn luditajn de niaj abonantoj. Mi petas, do ke la anoj de nia gazeto helpu min, sendante iliajn ludnotojn. Plue, eble mi povos presigi ankaŭ problemon aŭ ludfinon per la notado Forsyth'a, kaj iniciati sistemon por donaci malgrandan premion al la solvantoj laŭvice. Tiun sistemon mi klarigos poste. Mi ankaŭ konsideras areton da ŝaklecionoj por lernantoj.

Jen vi havas mian planon por la estonteco. En tiu-ĉi numero mi havas spacon nur por unu ludo, kiun, mi esperas, intereso vin, ne tial ke ĝi estas bone ludita, — tute kontraŭe, — sed ĉar ĝi estas ludita inter diversnaciajnoj per Esperanto. Blanko estas juna universitata studento, kaj ne sperta; ja, oni povus diveni ke li estas lernanto, kiel ni ĉiuj estis, estas kaj estos.

## LUDO No. 1

### CENTRA LUDKOMENCO

Blanko

1. S — 4 R
2. S — 4 D

Centra Ludkomenco, kies ĉefa celo estas rapide malvolvi la damflankajn pecojn kaj reĝsalti damflanken, por ke TD regu la damlinion.

- |            |             |
|------------|-------------|
|            | 2... S × S  |
| 3. D × S   | 3. Ĉ — 3 KD |
| 4. D — 5 D |             |

La kutima iro estas 4. D—3R, kie N. ne povas ataki la D-on. La teksta iro permesa al N. malvolvi siajn pecojn, dum B. nur ĉirkaŭmovas sian D.

- |             |              |
|-------------|--------------|
|             | 4... Ĉ — 3 K |
| 5. D — 4 K  | 5. S — 4 D   |
| 6. S × S    | 6. Ĉ × S     |
| 7. Ĉ — 3KR  | 7. K — 2 R   |
| 8. S — 3 TD |              |

Nigro

1. S — 4 R

Sencele; B. ne vidas ke N. deziras reĝsalti kaj ataki lian R per TR. Li ne elsekvas la motivon de sia ludkomenco.

8.. Reĝsaltas

- |             |            |
|-------------|------------|
| 9. K — 3 D  | 9. T — 1 R |
| 10. K — 3 R |            |

Nun estas necesego ke B. reĝsaltu.

- |               |               |
|---------------|---------------|
| 11. K — 4 TR? | 10... K — 4 Ĉ |
| 12. K — 4 R   | 11. K × K     |

Ne ĝuste taksante la potecon de TN. Iel B. devas perdi la interŝanĝon almenaŭ.

12. K — 3 T

Simpla sed efika rimedo

- |             |                    |
|-------------|--------------------|
| 13. Ĉ — 3 K | 13. Ĉ × Ĉ          |
| 14. S × Ĉ,  | 14. K — 1 K, k. c. |

### PROBLEMO 1<sup>a</sup>

Alfred de Musset, glora poeto franca de la 19-a jarcento, tre ŝatis la ŝakludon. Iu vetis, ke li ne kapablos fari problemon por mortigi la Reĝon per la ĉevaloj. Li elpensis la jenan problemon kiu estas ja tre bela. — Blanko komencas, kaj mortigas per la 3-a iro.

